

NORMOJ POR SUBMETI LA MANUSKRIPTON AL LA SCIENCIA REVUO

La dosiero devas havi formaton A4, unu kolumnon, la marĝenoj devas enhavi 2,5 centimetrojn dekstre kaj maldekstre, kaj en la supera kaj malsupera parto ĝi devos havi 3 centimetrojn kaj la interlinea spaco devas esti simpla. La literformato estas *times new roman*. Sen paĝrompoj. La lineoj devos esti nombritaj. Programo: Word aŭ RTF.

TITOLO: Litergrando 16, dika, centrigita. Ĉio majuskla.

AŬTOROJ: Saltu unu lineon de post la titolo por ke vi povu tajpi la nomon de la aŭtoroj. Litergrando 14. Centrigita. Nur devas aperi tute skribita la unua kaj lastaj nomoj. La ceteraj nomoj devas esti mallongigitaj. Okaze de pli ol unu aŭtoro, la nomoj devas esti apartigataj per komoj.

MEMBRECO KAJ KONTAKTO: Sen salto de lineoj, tuj sube al aŭtoroj. Litergrando 14. Itala.-Parenteze. Nur aldoni la retan adreson de la ĉefa aŭtoro.

RESUMO: Saltu unu lineon post membreco. La titolo Resumo, devas esti tajpita majuskle, dike, litergrando 13. centrigita. Saltu unu linion, la litergrando de la teksto devas esti 9, marĝenoj laŭliniigaj, sen citoj. Ne tajpi pli ol 200 vortojn.

ENKONDUKO KAJ CETERAJ SEKCIOJ de la artikolo devas esti dikaj Litergrando? Salti unu lineon por komenci la tekstkorpon. Akcepteblas subsekcioj. La subsekcioj devas havi italan formaton kaj direkton tajpitan al la maldekstra parto de la teksto. Oni apartigas la subsekciojn per nombra formo. Ekz: 1.1, 1.2, 1.3....

TEKSTKORPO: Litergrando 12. Interlinea spaco simpla. Laŭliniiga teksto. La komenco de la paragrafo kun malantaŭeniro.

BILDOJ: Ili povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj. Ili devas esti senditaj en la tekstkorpoj, ĝuste identigitaj en la manuskripto per mallonga maniero. Ekz: Bild. 1., Bild. 2. En la legendoj, la vorto bildoj devas aperi tute tajpitaj. La litergrando de la legendoj estas 9. La legendo restas tuj sube la bildoj. La akcepteblaj bildoformatoj estas JPEG, TIFF, JPG.

TABELOJ: povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj. Ili devas esti senditaj en la tekstkorpo, ĝuste identigitaj en la manuskripto per mallonga maniero. Ekz: Tab. 1, Tab. 2. En la legendo, la vorto Tabelo devas aperi tute tajpita. La litergrando de la legendoj estas 9. La legendo restas tuj supre la tabelo. Nepre sendu la tabelon kiel figuro.

CITAĴOJ: Posta nomo de la aŭtoro sekvata de la jaro, sen apartigo, inter parentezoj. Kiam temos pri du aŭtoroj, apartigu la postajn nomojn uzante &-n. Kiam pli ol du aŭtoroj, metu la nomon de la unua aŭtoro sekvata de et al. Kiam temos pri pli ol du citaĵoj, apartigu per komoj, sekvante kronologian ordon (de la plej malnova ĝis la plej ĵusa).

Ekzemplo:

1 aŭtoro - (Roberts 2014)

Du aŭtoroj de la sama referenco - (Roberts & Kavka 2014)

Pli ol du aŭtoroj de la sama referenco - (Stevens et al 2010)

Du referencoj - (Roberts 2014, Steves et al 2010)

Citi la aŭtoro en la kunteksto: Laŭ Roberts (2014), la rezultoj estis....

REFERENCOJ: Litergrando 10. Unua lieno kun malantaŭeniro maldekstren. Sen interlineaj spacoj en la referencoj.

Artikoloj:

Familia nomo, sekvata de la komencaj literoj de la nomo, apartigita per punktoj. Apartigi pli ol unu aŭtoron per punkto-komo. Tajpi la jaron inter parentezo. Titolo de la artikolo. Tajpi la tutan nomon de la revuo en itala formo. Meti volumonumeron, du punktojn kaj la paĝnombrojn, apartigitaj per streketo.

Ekzemplo:

Kataoka T., Sugiyana N., Matsumoto M. (1997) Effects of qi-gong vital energy on human neutrophils. *Journal of International Society of Life Information Science* 15: 129-37.

Se traktas pri reta revuo, anstataŭ skribi volumon kaj paĝonombron, nepre indiku DOI numeron aŭ similan identigilon.

Libroj:

Tajpi la aŭtorojn, organizantojn/eldonantojn. Jaro inter parentezoj. Titolo de la libro tajpita itale, Urbo kaj eldonejo.

Ekzemplo:

Groomed C & Roberts R (2016) *Psychology: the science of unusual experience*. NY, Psychology Press, 246p.

Ĉapitro de libro:

Tajpi aŭtorojn. Jaro inter parentezoj. Titolo de la ĉapitro. In: Familia nomo de la eldonanto/organizanto. Titolo de la libro itale. Urbo kaj eldonejo. Paĝo de la ĉapitro.

Ekzemplo:

Grad, B. (1976) The biological effects of the "laying on of hands" on animals and plants: Implications for biology. In Schmeidler GR, editor. *Parapsychology: Its Relation to Physics, Biology, Psychology, and Psychiatry*, Metuchen, Scarecrow Press, pp. 76-89.